Aperas almenaŭ 8-paĝa kun 4-paĝa aldono „2. Sprache für Alle“ la 5. de l' monato.

Leteradreso: Wien, I., Neue Burg, Telefono R-27-803

Manuskriptoj nur resendotaj kontraŭ reafranko.

Aŭstria Esperantisto

Jarabono komencebla ĉiumonate por Aŭstria ŝ 4.60, pagebla ankaŭ en partpagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj svfr. 4.25 (9 poŝtrespondkuponoj) Ponumere 45 g (1 prk).

Poŝtŝparkaso-konto aŭstria D 123.826.

Oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

N-ro 6 (143) Korneuburg ĉe Wien, la 5. junio 1937. 14. jaro

Internacia Konkurso 1937.

Premio de 200 sv. Fk. por akiri 20.000 membrojn.

Ekzistas miloj da organizitaj esperantistoj en la mondo, sed estas bone konate, ke estas almenaŭ dekoble tiom da neorganizitaj esperantistoj. Se ni povus instigi tiujn neorganizitajn samideanojn aliĝi al IEL aŭ al landa aŭ faka organizaĵo, nia movado estus tiel forta, ke ĝi povus devigi ĉe registarojn atenti ĝin.

Kiel komenco, IEL celas akiri ĝis la fino de 1937 almenaŭ 20.000 membrojn, el kiuj almenaŭ 5000 estu la tiel nomitaj „aktivaj membroj“ t. e. personoj, kiuj individue aliĝas kaj pagas por ricevi la jarlibron, ktp.

Por akceli la plenumon de tiu celo, IEL starigas konkurson inter la landoj kaj regionoj de la mondo, laŭ la jenaj kondiĉoj:

1. Por ĉiu membro aliĝinta al IEL estos donita poentoj laŭ la jena tabelo:

Asocia Membro	1
Membro kun Jarlibro	5
Membro-Abonanto	10
Membro-Abonanto-Heroldo	12
Membro-Subtenanto	15
Dumviva Membro (nova)	50
Patrono	50

2. La sekvanta tabelo, kompilita laŭ membro-ciferoj en la Jarlibro 1936, indikas la poentojn por la jaro 1935, kaj ĝi estas la elirbazo de la konkurso:

	AM	MJ	MA	MS	Patr.	Poentoj
Aŭstrio	—	10	19	1	—	255
Belgujo	266	49	132	10	1	2081
Britujo	1569	260	190	60	8	6469
Bulgarujo	—	1	7	—	—	75
Ĉeĥoslovakujo	250	215	261	7	—	4040
Danujo	—	19	43	4	—	585
Estonujo	—	10	8	—	—	130
Finnlando	—	13	13	—	—	195
Francujo	3094	354	256	19	2	7909
Grekujo	—	4	9	—	—	110
Hispanujo	1003	62	71	4	—	2080
Hungarujo	—	23	36	1	—	490
Italujo	—	12	41	6	—	560
Jugoslavujo	—	18	48	3	—	615
Latvujo	—	13	17	2	—	265
Litovujo	—	1	13	1	—	150
Nederlando	1300	260	162	33	1	4815
Norvegujo	—	3	9	1	—	120
Polujo	—	41	35	2	1	685
Portugalujo	—	5	34	2	—	395
Rumanujo	—	38	21	—	—	400
Svedujo	2369	34	43	1	—	2984
Svislando	400	50	61	10	—	1410
Afriko	—	16	30	1	—	395
Kanado	—	4	8	—	—	100
Usono	94	19	88	13	—	1264
Sud-Ameriko	500	19	28	10	—	1025
Azio	400	40	91	7	—	1615
Aŭstralio	—	10	39	2	—	470
Novzelando	—	4	19	—	—	210

3. Al la lando aŭ regiono, kiu montros la plej bonan procentan progreson dum la jaro, kompare kun la supraj ciferoj, IEL donos premion Pundoj 10 (200 sv. fr.) kaj artan diplomon. Se en tiu lando estas nur unu Landa Asocio, tiu asocio ricevos la premion. Se estas pli ol unu Landa Asocio, la premio estos dividata laŭ la jena araĝo:

a) se ĉiu asocio estas aliĝinta asocio de IEL, oni dividos egale la premion.

b) se unu asocio estas aliĝinto, tiu ricevos 2/3 de la premio, kaj la alia (j) la ceteron.

Krome, al ĉiu Delegito en la koncerna regiono ni sendos libro-premion.

STATO JE 31 MARTO 1937.

	Poentoj. Bazo	31. 3. 37	%
1. Aŭstrio	255	379	148.6
2. Hungarujo	490	418	85.3
3. Britujo	6469	4868	75.3
4, a) Italujo	560	419	74.8
4. b) Usono	1264	946	74.8
5. Norvegujo	395	267	67.6
6. Portugalujo	395	267	67.6
7. Aŭstralio	470	294	62.6
8. Novzelando	210	130	61.9
9. Belgujo	2081	1246	59.9
10. Bulgarujo	75	40	53.3
11. Litovujo	150	75	50.0
12. Sud-Ameriko	1025	501	48.5
13. Kanado	100	44	44.0
14. Nederlando	4815	1801	37.4
15. Francujo	7909	2934	37.1
16. Ĉeĥoslovakujo	4040	1478	36.6
17. Svedujo	2984	1026	34.4
18. Grekujo	110	37	33.6
19. Danujo	585	191	32.6
20. Azio	1615	430	26.6
21. Polujo	685	166	24.2
22. Jugoslavujo	615	140	22.8
23. Finnlando	195	41	21.0
24. Afriko	395	70	17.7
25. Latvujo	265	30	11.3
26. Svislando	1410	92	6.5
27. Rumanujo	400	25	6.3
28. Estonujo	130	—	—
Hispanujo	2080	—	—

Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj.

Jam estas ĉe ni pli ol 1500 adresoj. Bonvolu vin tuj anonci, por ke vi certe estos en ADRESARO. Ĉi tiu libro estos bonega helpilo kaj varbilo. Kotizo: 1 sv. fr. aŭ 1 angla ŝilingo aŭ 2 resp. kuponoj, se vi baldaŭ vin anoncos. Por tio estos enpresota via nomo, profesio, adreso kaj (laŭ via deziro) aparteneco al via organizo kaj grupo, Krome vi ricevas la ADRESARON afrankite la 15. dec. 1937 Se vi deziras aldoni, ke vi ŝatas interŝanĝi ion aŭ korespondi ktp., vi devas por 8 vortoj alpagi la saman sumeton. Neniu preterlasu la tujan aniĝon kaj instigi siajn amikojn al sama agado Int. Esp.-Muzeo, Wien, Neue Burg, Aŭstrio.

Anoncis Grupo en Zwittau (CSR) kaj E.-Klubo en Wien jam po 50 membroj por la Adresaro. Ni ne dissendas aliĝilojn, sed petas, ke vi simple sendu precizajn datojn en aparta listo kaj la monon al ni.

Monon vi povos sendi al konto de Aŭstria poŝtŝparkaso D-123.826 sub la nomo „Aŭstria Esperantisto, Korneuburg“, aldonante 15 g por la elspezoj.

Radio Wien.

11. junio: Rudolf **Ulbrich** „Per poŝtaŭto tra la ĉarma aŭstria alparo“.

25. junio: **kort. kons. Steiner** „Bruckner-aranĝoj en Supra Aŭstrio“.

Jubilea Kongreso de Esperanto.

Warszawa, 7.—15. aŭgusto 1937.

Adreso: Warszawa, 1. str. Chmielna 26, m. 8.

Ĝis 30. de junio (rabato 10%): I. angl. ŝ. 31/6, II/—, III. 12/6.

Pola Poŝtĉekkonto: 29 Univers. Jubilea Kongreso de Esperanto, Warszawa Nr. 23.445.

Aldono al Interkonsento inter IEL. kaj LKK. Ambaŭ Komitatoj interkonsentas, ke la licencpago estos dividita inter IEL kaj UEA laŭ la principoj proponitaj de Sveda E.-Federacio (3. II. 1937) konforme al la deziroj de la kongresanoj mem. LKK estas respondeca al IEL kaj UEA pri la laŭstatuta plenumo de la licencpago. La licencpago estas pagata laŭ la deziro de la kongresanoj. El tio rezultas, ke la kongresanoj, kiuj venos el landoj, kies asocioj aliĝis al IEL, estas konsiderotaj kiel IEL-membroj, se ili ne esprimas alian deziron. La teknikan flankon prizorgos LKK interkonsente kaj sub la kontrolo de IEL kaj UEA.

Sama aldono validas por interkonsento kun UEA.

Internacia Balo.

LKK petas kunpreni naciajn kostumojn.

Strata demonstracio esperantista.

Por ĉi tiu celo bonvolu alporti vian standardon kaj nacian flagon.

Karavano aŭstria:

Anoncu vin al kort. kons. Steiner, Wien, I., Neue Burg.

Propagandaj broŝuroj jam aperis pri Varsovio, Krakovo, Vilno kaj Gdynia, eldonitaj de Pola Trafikministerio. Baldaŭ dissendotaj.

Jubilea Stelo.

Pioniroj de nia movado sendu al ni viajn nomojn, adresojn kaj sugestojn.

Murafiŝoj propagandaj, senpage sendotaj al ĉiu, kiu mendos ilin.

Aliĝis jam pli ol 400 personoj. Ne hezitu kaj tuj anoncu vin!

Morariu-kursoj nun en Varsovio!

Venu Varsovion!

(Parolado de f-ino Lidia Zamenhof antaŭ la mikrofono de Lyon P. T. T. la 4-an de aprilo 1937)

Karaj gesamideanoj! Antaŭ nelonge la kalendaro anoncis alvenon de la printempo. Kaj kun la kreskanta lumo kaj varmo de la tago nia penso rapide trakuras la printempan periodon, kaj jam ni revas pri nia somera libertempo, jam ni faras planojn por niaj someraj plezuroj kaj vojaĝoj.

En la nuna malgaja tempo, kiam la suspektoj kaj malamo pendigas nubon super la homaro, kio povas esti pli plezura por la vera esperantisto, por ĉiu sincera homo, ol trovi sin inter homoj de bona volo, inter samideanoj, kiuj parolos al vi sen pensoj kaŝitaj, sen suspekto kaj malamikeco. Kio povas esti pli plezura, ol trovi sin en tiu revata lando, kiun ni nomas Esperantujo?

Kaj en ĉi tiu jaro la civitanoj de tiu lando pilgrimos al sia Mekko: el ĉiu anguloj de la mondo ili iros en Varsovion. Pelas ilin tien forta deziro paŝi sur tiuj lokoj, kie paŝadis ilia Majstro. Pelas ilin tien sopiro spiri la aeron, kiu spiradis ilia Majstro. Pelas ilin tien korinstigo rigardi tiun domon en la juda kvartalo de la urbo, kie li laboris dum preskaŭ 20 jaroj de sia laborplena vivo, kaj la alian domon, kie li spiris sian lastan spiron, kaj fine pušas ilin al Varsovio la potenca interna ordono klini la kapon antaŭ la loko de lia eterna ripozo. La memoro pri la Majstro vokas al ĉiu sincera samideano: Venu Varsovion!

La verda stelo de Esperanto kondukos ĉi-jare al Varsovio la esperantistojn el plej diversaj landoj de la mondo, same kiel iam la stelo kondukis la magojn al Betlehemo.

Kaj unu tago de la kongreso estos dediĉita al speciala pilgrimo: ĉar el la esperanta Mekko, kiu estas Varsovio, la tombourbo de la Majstro, vi iros en Medinon, en la urbon Bialystok, kie por la unua fojo ekvidis la tagan lumon tiu, kiu laboris dum la tuta vivo, por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj. Vi vidos tie la malnovan lignan dometon, preskaŭ kabanon, kiu estas la naskiĝdomo de la Majstro.

Kial do vi hezitas? Kio vekas viajn dubojn? Kial ĝis nun ne multaj decidis firme: Mi iros!?

Ha jes, ankaŭ super la stelbrila Esperantujo ekpendis iaj nuboj. La organiza problemo ĵetas siajn ombrojn kaj multaj demandas sin malkviete: Kiel estos en Varsovio?

Meze de tiuj hezitoj, baraktoj kaj malcertecoj la Loka Komitato akceptis decidon plej ĝustan en tiu ĉi momento kaj plej demokratan: al neniu ĝi donis tronon kaj sceptron, sed ĝi turnas sin al ĉiuj esperantistoj en la mondo, dirante al ili: Bonvenon al vi, el kie ajn vi venas! Bonvenon al vi, al kiuj ajn vicoj vi apartenas!

La Varsovia Loka Komitato laboras en kondiĉoj tiel malfacilaj, kiel eble neniu alia komitato antaŭe. Kaj ĝi laboregas sindone, por certigi al vi plej grandiozan jubilean feston, plej agrablan restadon apud la rivero Vistulo, plej altsentajn impresojn pri la semajna restado en Esperantujo.

Ĝi laboras ankaŭ por certigi al vi agrablajn distrojn. Ĝi laboras, por ke vi trovu en Varsovio bonan akcepton, sed ĉefe kaj antaŭ ĉio ĝi laboras ne por turistaj aŭ distraj celoj. La ĉefa celo de la Loka Komitato estas doni al la samideanoj la eblecon de serioza esperanta laboro, la eblecon grandioze manifestacii la 50-jaran Jubileon de Esperanto kaj eternigi en la koroj de ĉiuj partoprenantoj neforgeseblan memoron pri la Jubilea Festo en Varsovio, tian memoron, kian neforviŝeble gardas en la koroj tiuj, al kiuj la sorto permesis partopreni la unuan Kongreson en Bulonjo sur Maro. Ĝi penas krei atmosferon tian, kia regis en Bulonjo, kie, laŭ la vortoj de Zamenhof, kunvenis unuafoje ne poloj kun rusoj, ne francoj kun germanoj, sed homoj kun homoj.

Kaj ĝi esperas, ke inter same gastamaj muroj de Varsovio, apud Vistulo, kunvenos denove ne nacianoj kun nacianoj, ne partianoj kun partianoj, sed homoj kun homoj, samideanoj kun samideanoj!

Kaj vi, karaj samideanoj, kiuj min aŭdas ĉimomente, ne prokrastu, ne hezitu eĉ unu minuton pli: aliĝu tuj al la Jubilea Kongreso en Varsovio!

FESTSEMAJNOJ EN WIEN

Ekspozicioj pri teatro,
muziko, dancado, sporto.

La malfermo de Vienaj Festsemajnoj okazas hodiaŭ post ek-vesperiĝo sur la granda placo antaŭ la urbdomo. Parolos Federacia Prezidanto kaj la Urbestro. Poste okazos festlumigado de la urbdomo kaj du grandaj orkestroj prezentos Danubo-valson de Strauss.

La Festsemajnoj kun belega programo okazos de 6.—20. junio.

Pri Zamenhof — Geni'!

Dediĉe al Halina Weinstein.

Vi estas kulpa, ho, knabin'!
Ke mian frunton kovris ombr'...
Mi skribis, laŭ la korinklin',
Propagandaĵojn ja sen nombr'...
En artikoloj pruvis mi
Kaj kantis mi ne unu kanton, —
Ke estis Zamenhof — geni'
Kaj kreis lingvon Esperanton,
Ke estas lingvo — ĉi sub sun'
La plej facila, ideala,
Ke por homaro restas nun —
Fratiĝi sur la baz' neŭtrala!...

Kaj nune petas Vi, knabin',
Ke mi, maljuna... senidea...
Tre laca... revivigu vin
Per artikolo jubilea!
Vi memorigas pri la rev'
De la studentaj miaj jaroj;
Vi diras, ke ekzistu dev',
Ke mi trasaltu tra la baroj
Ke la amik' de l'Majstro, mi
Pruvos per mia plum' flamanta,
Jam versperiĝis... ho, ve! — mi
Elpensis veron tre gigantan,
Ke estis Zamenhof — geni'
Kaj kreis lingvon Esperantan!

Ne! Mi ankoraŭ per labor'
De l'tuta tago rememoris,
Ke la progres' de nuna hor'
Malamikecon jam traboris,
Ke estas atingita cel'
Duone — sur la baz' neŭtrala,
En cerbo — ĝis malfrua horo
Iun penseron, ion ajn,
En kio estus nova brilo,
Imago nova, nova ŝajn' —
Valora novpropagandilo!

Ke geniulo estis Li
En la kreaĵ' homfratiganta...
Mi sidas nun kun nuba frunt'
La tutan tagon, de l'aŭroro,
Kaj serĉas en la kora fund',
Per Lia lingvo — sonjuvel',
La plej facila, ideala:
Renkontas sin en nia rond'
Samideanoj elegante,
Juras fratecon antaŭ mond',
Sed... ne parolas Esperante...

Okazas ankaŭ — ve! — tro brue
Sceno mirinda, preskaŭ koka:
Parolas du kunuloj flue
En insultado reciproka!

Leo Belmont.

Pri Aranĝoj de la Kongresoj.

Ofte oni aŭdas, ke la kongreskotizo estas tro alta. Ni provu esplori, ĉu vere estas tiel. Anticipe ni diru, ke ja 20% de la kongreskotizoj enfluas en la kasojn de niaj Centraj Organizaĵoj, helpante, tamaniere, al la disvolviĝo de la Movado. Ni do vidu kion ricevos la Kongresano por 80% de sia mono.

1) Por eniri en la landon oni bezonas nur vizon. Kongresanoj ricevos ĝin, kompreneble, senpage.

2) Krom multaj dokumentoj, insigno, kongreslibro, oficiala monatgazeto „LA JUBILEA", kongresanoj ricevos 300 — nuran „Oran Libron" de la Esperanta Movado.

4) Unika aranĝo estos kabaredo kun artista programo, okazonta dum la Internacia Vespero.

5) Solena Malfermo de la Kongreso kiam postlasas neforgeseblan impreson pri ĉiu partoprenanto.

6) Solenaĵo ĉe la Tombo de nia neforgesebla Majstro. Ĝin partopreni ja revas ĉiu Esperantisto tra la mondo.

7) „Festo de Veteranoj", dum kiu ni honorigos tiujn al kiuj ni ŝuldas la staton de nia Movado.

8) Internacia Balo — certe ne bezonas reklamon, des pli ke dum ĝi okazos diversaj surprizoj. (Alportu naciajn kostumojn, sed ne fantaziajn. Ni ne faru maskobalon kaj ne ridindigu Vin).

9) Folklora prezentado montros al la kongresanoj diversecon kaj variecon de polaj naciaj tipoj, kostumoj, dancoj.

10) Esperanta prezentado kaj koncerto ankaŭ okazos.

11) Por montri al la vasta publiko nian ekziston okazos demonstracio tra varsoviaj stratoj, kunligita kun enmurigo de memortabulo en la domon kie loĝis kaj mortis la Majstro.

12 Ekskurso al Bjalistoko — naskiĝurbo de Zamenhof (75% fervoja rabato garantiata. Ni klopodas, ke ĝi estu tute senpaga).

Baden bei Wien, kuracdomo kun ludokazino.



13) En kadroj de la Kongreso okazos ankaŭ TEKA-kongreso, kiu estos potenca demonstracio inter kuracistoj. Ni notu, ke polaj sciencaj aŭtoritatoj multe helpas al sukcesigo de tiu ĉi Kongreso.

14) Grava estas ankaŭ TAGE-konferenco, kies signalvorto estas „esperanto en la lernejojn".

15) Ĉu ni povas forgesi pri niaj blindaj amikoj, kiuj kunsidos aparte.

16) Ankaŭ multaj aliaj gravaj organizaĵoj kunsidos dum nia Jubilea.

17) Aldone ni diru, ke dum la kongresaj tagoj okazos gvidado tra la urbo, senpaga vizito al ĉiuj muzeoj kaj bildgalerioj kaj ke kongresanoj profitos de rabatitaj biletoj en urbaj tramoj.

Jen estas nur supraĵa kaj neplena skizo de la aranĝoj de la Jubilea Kongreso. Ju pli frue Vi aliĝos, des pli bonaj ili estos. Tial ne hezitu kaj aliĝu tuj al la Kongreso, por ke ĝi estu vera, impona manifestacio de nia movado.

Memoru, ke Varsovio, la urbo de Zamenhof atendas kaj kore bonvenigas Vin.

Estu la Kongreso vera festo de la Tutmonda Esperantistaro.

TAGE.-kunvenoj:

Programo de la kunvenoj laŭ kongresprogramo:

1. Malfermo kaj laŭtlegado de salutleteroj, parolado de prez. de TAGE d-ro Bj. Beckman, Karlskrona pri „Kelkaj internaciaj instruistaj problemoj", diskutado, Informa prelego de d-ro A. Czubrynski pri „Interŝtata Esp.-Akordo"; 2. Prelegoj: a) enkonduko de E. en lernejojn, b) internacia interŝanĝado de gelernantoj, c) interlerneja korespondado. Dikutado. Raporto pri Intern. Pariza Konferenco, precipe pri infankursoj; prelego de gimn. prof. M. Sygnarski, Bydgoszcz „Kion opinias junularo pri E.".

La ĉefa afero estas enkonduko de E. en la lernejojn. Tial E. estas antaŭ ĉio instruista afero. La sukceso dependas sole de partopreno de alilandaj kolegoj, kiuj donos al la kunvenoj la karakteron de malgranda Int. Pedagogia Kongreso kaj povos popularigi la rezoluciojn.

Kolegoj anoncu vian ĉeeston antaŭ la kongreso.

D-ro Bj. Beckman, prez.
D-ro A. Czubrynski, Ped. Kom.

Radio Wien.

Vi scias, ke la E.-kurso en Radio Wien pro ioma ŝanĝo de la programo devis finiĝi pli frue ol la aliaj lingvokursoj — pro ne tro granda emo de la programestro de la stacio al Esp. — Mi nun ricevis ĝis nun proksimume 2000 subskribojn kun leteroj kun la peto, ke mi klopodu, por ke mi gvidu denove en aŭtuno E.-kurson, sed en la tempo inter la 18—19 h, por ke ankaŭ dungitoj kaj laboristoj povu aŭskulti. En Aŭstrio kaj en 11 landoj ekster Aŭstrio grupoj kaj unuopaj samideanoj sendis al mi leterojn, sur kiuj ili tiajn kolektis subskibojn de konatoj kun profesio kaj adreso (de kelkaj mi eĉ ricevis 100 kaj pli da subskrinoj; mi publikigos la nomojn de tiuj, kiuj plej multe klopodis). Eksterlandanoj skribis, ke ili volonte aŭskultas la kurson, ĉar ili multe aŭdas pri Esp. kaj krome ankaŭ aŭ lernas la germanan lingvon aŭ plibonigas siajn koncernajn konojn. Kiu ne ankoraŭ skribis tian leteron, sendu ĝin ne al la Radio-stacio, sed al mi, kiu kolektas ilin kaj transdonos al la Ministro por Komerco. Do ek al agado! Dankon: Steiner, Wien, I., Neue Burg.

Prof. Wladimir Köpen

ricevis la „Aglo-ŝildon" de Germana Regno.

La 5. de aprilo la mondfama meteorologo kaj iama sekci-estro en Germana Marobservatorio en Hamburg, sekreta konsilisto prof. d-ro Wladimir Köppen, ricevis la Aglo-ŝildon de Germana Regno, la sola civila honorsigno en Germanujo — ne ordeno, sed dekoraĵo, granda bronza medalo staranta sur peza bazo.

Prof. Köppen, kiu festis la 25. septembro sian 90-an naskiĝtagon, vivas depost multaj jaroj en Graz, Aŭstrio. Li estas malnova esperantisto kaj unu el la malmultaj germanaj scienculoj, kiu kuraĝis labori por Esp. Ekkoninte la Zamenhofan helplingvon en 1908, li verkis jam en 1909 propagandan artikolon por la Kongres-libro de Gotha. En geografia gazeto li proponis la alfabeton de Esp. por la transkribado de geografiaj nomoj. Li ankaŭ partoprenis en aliaj kulturceladoj ekz. la reformo de l' kalendaro. Köppen estas posedanto de la Arĝenta Honorinsigno de Aŭstria E.-Asocio.

Koran gratulon: IEMW — AEA — AE.

La kuraclokoj en Aŭstrio.

Radio-parolado el stacio Wien, farita de d-ro Lothar Steiner, la 28. de majo 1937.

La plej konata inter la aŭstriaj kuraclokoj, la graco de eterna juneco, estas **Bad Gastein.** Tiu ĉi perlo en la alpolando de Salzburg situas 1000 m super la marnivelo sur arbarkovrataj deklivoj de la montegoj en la valo de Gastein-a Ache. La domoj grupiĝas pitoreske, amfiteatre ĉirkaŭ la akvofalo de Ache, kiu en du stupoj falegas 204 m malsupren.

La origino reiras en la grizan miton. Jam imperiestro Frederiko IIIa en la 15. jc. uzis la kuracfontojn, en 1904 oni ekkonis la radio-aktivecon de la varmfontoj, kio kun la ekfunkciigo de la fervojo trans Tauern-montegaro kaŭzis plian prosperon de la kuracloko. Gastein situas tute ventŝirmate. La varmfontoj kun temperaturo inter 28—50° C estas uzataj por trink- kaj bankuracado, inhaladoj kaj ankaŭ por dissendado.

Hofgastein estas ĉarma vilaĝego, 869 m super la maro, inter Hohe Tauern-montegaro de Gastein-a Ache, en vasta, ĉarma valvastiĝo kun alpoherbejoj kaj arbaroj kaj kun libera rigardo al la grandioza valfino, kiun formas sude la glaciigita Tauern-ĉeno de Anlauf-valo. La varmfontakvo kun temperaturo de preskaŭ 45° estas kondukata de Bad Gastein ĉi tien, kaj uzata kiel trink-kaj banakvo.

Sur antikva kulturgrundo en Aŭstrio, proksime al Wien, situas unu el la plej ĉarmaj urboj de nia patrolando, **Baden bei Wien.** Multnombraj trovaĵoj dokumentas la ekziston de granda roma banejo jam en la 1. jc. Ĉirkaŭ la jaro 1500 denove estiĝis banejoj. Baden, meze en la arbarregiono de Wienerwald, posedas 33 sulfurvarmfontojn, uzataj por trink- kaj bankuracado, inhalado kaj gargarado.

La fratina urbo de Baden estas **Vöslau** (elp. Veslaŭ); ĉe la arbarriĉaj deklivoj de Lindkogel-ĉeno; ĝi estas vilao-kolonio meze en ĝardenoj kaj sur la sunaj montdeklivoj kreskas ŝatata vino.

Varmfontoj liveras ĉiutage 28.000 hl da akvo kaj provizas ankaŭ grand-dimensian naĝbanejon, kiu ebligas krom saniga efiko samtempe sportan praktikadon. Vöslau estas preferata semajnfin-celo de la Vienanoj.

Bad Gastein kun la fama Ache.
La klišoj pri kuraclokoj disponigitaj de „Oesterr. Verkehrswerbung".

Proksime al la urbo Villach en Karintio, sur la deklivoj de la elrigardriĉa monto Dobratsch, en belega parko, situas pitoreska ban-kolonio, **Warmbad Villach.** La varmfonton jam en la mezepoko Paracelsus, la fama kuracisto kaj mistikisto, famigis sub la nomo „Aqua Villacenses". 29 varmfontoj provizas du basenojn kaj la banĉambretojn.

Bad Ischl (Iŝl) en Salzkammergut, Supra Aŭstrio, estas granda foirego kun dometoj en Biedermeier-konstrustilo, 468 m alte situita, en valvastiĝo ĉe la kunfluo de Traun- kaj Ischl-riveroj, en tre varia, vere ĉarma pejzaĝo. Ĝia prospero komenciĝis kiam la imperiestra familio en 1827-a ekrestadis dumsomere ĉi tie, kio ankaŭ kaŭzis multajn vizitojn de alilandaj suverenoj. Ischl posedas subalpan, malsekvarman klimaton, per la montoj bone ŝirmata kontraŭ ventoj, tial speciale aerkuracloko ankaŭ vintre. Unu sulfurhidrogena, du salaj kaj du simplaj malvarmaj fontoj servas por trink- kaj bankuracado kaj inhalado. Salbanoj estas ankaŭ uzeblaj en la nova kuracil-domo.

En 650 m alteco, en multbranĉa rondvalo ĉe la kunfluo de Alt-Ausseer-, Grundlseer- kaj Krainisch-Traun-riveroj en ege ĉarma, arbar-riĉa montpejzaĝo situas **Bad Aussee,** la ĉefloko en Stiria Salzkammergut. Pro la ĉirkaŭaj altaj montoj Aussee precipe estas aerkuracloko. Banoj kaj inhalado kun salakvo, malvarmaj banoj en proksimaj lagoj de Grundl kaj Altaussee kun akvotemperaturo de 16—21°.

Inter Ischl kaj Bad Aussee estas aerkuracloko **Goisern** kun varma brom- kaj jod-enhava sulfur-fonto.

Gleichenberg en Stirio disponas pri alkalmuriataj acidet-fontoj por trink-kaj inhalkuracado kaj por dissendado, krome pri ferenhava acidet-fonto por trink- kaj bankuracado. Gleichenberg estas bela foirego en 305 m alteco en vasta arbar-riĉa rondvalo proksime al la hungara limo. Ĉirkaŭ la domoj vastaj parkaranĝoj, sur la altaĵoj kelkaj kasteloj, kiuj altigas la pitoreskan ĉarmon de la regiono. La klimato estas iomete malsekvarma. Tre bona ŝirmado kontraŭ vento kaj malfermata kontraŭ sudo.

La plej juna kaj ege esperdona banloko en Aŭstrio estas la nuntempe ankoraŭ idilia kaj simpla foirego **Schallerbach,** proksime al la granda industria urbo Wels en Supra Aŭstrio, 303 m alte situita en monteta varia scenaĵo. La fonto venas el 460 m profundeco kun temperaturo de 36°, havas pli altan radioaktivecon ol Bad Gastein kaj la plej altan gradon je boracido inter ĉiuj eŭropaj varmfontoj.

Same en Supra Aŭstrio en 376 m alteco la jodbanloko **Bad Hall,** sur altaĵo inter la riveroj Krems kaj Steyr, oriente de la fama abatejo Kremsmünster, en tre fruktodona, ĉarma montetarregiono kun bela rigardo ĝis la montĉeno de Böhmerwald en la nordo, al Totes Gebirge (montaro) kaj Traunstein-montego sude kaj okcidente. La fontoj jam estis konataj al la keltoj, kiuj el ili produktis salon.

Deutsch-Altenburg kun sia sulfurfonto en Malsupra Aŭstrio, proksime al la ĉeĥoslovaka limo ĉe la malsupro de Hainburger montoj, sur malaltaj terasoj super la dekstra bordo de Danubo-riverego. La lokoj Deutsch-Altenburg, Petronell kaj Hainburg staras sur la grundo de iama roma urbo Carnuntum. Proksime ankoraŭ estas postrestaĵoj de roma konstruarto kaj kulturo, inter ili tiuj de baninstalaĵoj, kiuj montras, ke la romoj jam ŝatis la sulfurfonton.

Kitzbühel, la plej fama aerkuracloko kaj vintrosportejo en Tirol kaj en tuta Aŭstrio estas tre ŝatata pro la ŝlimbanoj en Schwarzsee (lago) kun temperaturo de 18—27°. Depost 20 jaroj per fera tubaro la akvo estas el la lago alkondukata al banejo en la urbo.

Krome estas ankoraŭ salbanloko **Hall in Tirol,** proksime de la ĉefurbo Innsbruck, kun akrato-varmfontoj ankaŭ **Tobelbad** sur altaĵ-ŝoseo trans Pack en Stirio, **Bad Fischau** en Malsupra Aŭstrio krome en belega altmontarregiono varmfonto ankaŭ dumvintre sub ĉielo uzebla en **Hintertux** en Tirol (1494 m super la maro). Krome ekzistas ankoraŭ bonegaj karbonacidaj fontoj en **Bad Tatzmannsdorf** en Burgenland kaj acidfontoj en **Sauerbrunn** en Burgenland.

Ankoraŭ estu citataj kelkaj pli malgrandaj: la sulfurbanloko **Längenfeld** en la valo de Oetz, **Obladis** en la supera valo de Inn, **Wörschach** en Stirio, kiel ankaŭ en **Bad Einöd** estas varma feracidfonto. Kun „akratopegoj" **Bad Fusch** ĉe ŝoseo trans Großglockner, **Bad Ischl'sberg** en Karintio kaj **Weitlanbrunn** en orienta Tirolo.

La kuraclokoj kaj la pli ol 200 kuracejoj kaj sanatorioj en Aŭstrio ebligas laŭfakan kuracadon sub unuaranga kuracista gvidado.

Esperantista Somer-restadejo en Aŭstrio.

Flugfolio kun du bildoj, kiu montras al vi, ke vi bone ripozos dum ferioj ĉe unu el la plej belaj lagoj en Aŭstrio, en la urbo Gmunden, en belega situo. Skribu pri restado al **Hotel Schiff** en Gmunden. Plena pensiono kun tri kompletaj manĝoj aŭstr. ŝ 8.20. Informoj kontraŭ respondkupono: Aŭstria E.-Asocio, prez. reg. kons. Stengel, Wien, XVII, Syringgasse 3.

Advokato Alfred Michaux,
organizinto kaj prezidinto de Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer (1905) mortis la 20. de marto. Li naskiĝis 5. VII. 1859 kaj estas inter la plej varmaj kaj agemaj propagandistoj de la pionira epoko. Li prezidis Internacian Societon de Juristoj. Michaux verkis ankaŭ helplingvon (latino simpligita) nomitan „Romanol".

La memoro al la iniciinto de niaj Universalaj Kongresoj restos.

D-ro Jan Medrkiewicz,
unu el la veteranoj de E.-movado en Polujo, mortis la 9. de aprilo en Lublin.

Espero Katolika. S-ano P. M. Brouwer en Den Haag fariĝis ĉefredaktoro. Ni kore salutas nian novan kunlaboranton sur la E.-kampo. Abonejo por Aŭstrio: Leopold Chiba, Wien, IV., Schaumburgerg. 5/25.

Aŭst. Elsb 1937 junio

La Higien-Ekspozicio Wien 1937.

Radio-parolado de Ernst Werner.

15. majo malfermiĝis en Viena foirejo granda ekspozicio pri higieno, kiu meritas atenton ankaŭ trans la limoj de la urbo kaj lando, kiuj ĝin aranĝis. Elirante de la principoj „mienso sana en korpo sana“ kaj „sana popolo — sana ŝtato“, la Aŭstria registaro, la urbestro de Wien, la ŝtata ligo de la social-asekuraj instancoj kaj la reprezentantoj de la publikaj korporacioj decidis aranĝi la higien-ekspozicion kaj kreis ĝin en konkorda kunlaboro. La Viena foiro transprenis la afergvidadon de la agadkomitato konsistanta el la nomitaj faktoroj.

La higieno kiel konservado de la saneco aŭ san-scienco esence estas jam tre malnova, sed nur en la nova tempo, per la progresoj de la medicino kaj la apliko de la tekniko al higienaj antaŭzorgoj, ebliĝis ĝenerale kaj daŭre plibonigi la vivkondiĉojn per enkonduko de koncernaj leĝoj kaj samtempa klerigado de la tuta popolo pri saneco kaj celo de la higieno. Ke malaperis multaj epidemioj, ke malpliiĝis la mortado de infanoj kaj entute plisaniĝis kaj plilongiĝis la homa vivo, faktoj malofte ĝuste konsataj, tion ni dankas unuavice al la ĝenerala aplikado de la moderna higieno. Rekonante la sciencajn premisojn de la higieno, la Viena ekspozicio dediĉis unuavice honorspacon al la memoro de tiuj pionientuloj, kiuj donacis al la tuta mondo grandajn valorojn sur la kampo de la medicino kaj higiena esplorado.

La higieno dividiĝas en personan kaj publikan sankulturon. La unua estas tasko de la instruado kaj edukado. Ĝin montras en la ekspozicio la **Ministerio por Instruado** per prezento de la higiena kaj korpa edukado en ĉiuj lernejoj de la infanĝardeno ĝis la universitato.

La dua, la publika sankulturo, estas tasko de la publika administrado kaj estas en Aŭstrio gvidata de **„Volksgesundheitsamt“** (t. e. oficejo por popola saneco) en la **Ministerio por Sociala Administrado**, kiu havas la plej supran kontrolon pri ĉiuj sanecaj oficejoj, institutoj kaj institucioj en la federaciaj landoj kaj la komunumoj. En la higien-ekspozicio la sekcio de la **Ministerio por Sociala Administrado** montras la instituciojn kaj faroj-n de la ŝtata antaŭzorgo pri saneco en Aŭstrio kaj allige la sanprizorgadon en la propra sanco. Je la nuna fojo sur tiu ĉi kampo estas en larĝa aranĝo prezentitaj laborhigieno, metihigieno kaj laborsŝirmo kontraŭ akcidento; plue estas montritaj la estiĝo kaj antaŭgardo de profesi-malsaniĝoj. Sed la sanprizorgadon servas ankaŭ la regulado de loĝejoj kaj farmejoj el la higiena vidpunkto, la malsanulejoj, la ŝtata kontrolo de la kuraciloj, la prizorgado de suĉinfanoj kaj de metiservantoj, la inspektado de metioj, la ŝtata kontrolo de la nutraĵoj, la batalo kontraŭ la alkoholo kaj la savinstitucioj. Aparta montraĵo prezentas la intensivan sanprizorgadon de la police kaj de Libervola Laborservo.

Alia sekcio de la ekspozicio estas ekipita de la **Ministerio por Landa Defendo:** Ĉi tie estas montrite, kion kapablas efiki sistema edukado kaj nutrado por la pligrandigo de la agadforto de l'individuo, kaj aliflanke, kiel zorgeme oni traktas la nutradon kaj vestadon de la soldataro, kiel bone antaŭzorgas la konstrusekcioj de la defendministerio, kiel bone pripensita estas la resaniga ekipaĵo de ĉiu soldato k. t. p. Ankaŭ la savado en la Alpoj kaj la moderna ŝirmo kontraŭ aeratakoj estas elmontritaj, kaj kinobildoj vivе kompletigas la materialon de la ekspozicio.

La ekspozicio de la **urbo Wien** dispartiĝas unuflanke en la socialan administradon kaj prizorgadon kaj aliflanke en la teknikajn aranĝojn sur la kampo de la publika higieno. Por citi nur kelkajn el la ĉi tie prezentitaj komunumaj institucioj, estu menciataj: la urba konsilejo por edziĝoj, la konsilejoj por gravedulinoj kaj patrinoj, la urba akuŝejo, la azilo por senhejmaj knabinoj, virinoj kaj patrinoj, la centra infanejo, la senkosta disdonado de tolaĵoj por suĉinfanoj, la popolbanejoj kaj liberaj banejoj por infanoj; plue la akvoprovizado, la kanaligado, la fortransporto de la rubo, la purigado de la stratoj kaj multo alia.



La vitra homo.
Disponigita de Viena Foiro.

Aparta sekcio de la ekspozicio estas aranĝita de **Patrolanda Fronto,** inter kiaj politikaj taskoj sendube gravas la certigo de l'saneco de la venonta generacio Aŭstria. Tial Patrolanda Fronto prezentas superrigardon pri la agado de sia **Porpatrina Helpverko,** la benoriĉajn sukcesojn de sia agado por bonaj ferioj de l'infanoj kaj kompletigas tiun prezentaĵon per priskribo de **Virina Referato.**

Sed la plej alloga parto de la ekspozicio estas certe la nova granda salonego, en kiu la multspeca materialo de **Germana Higien-Muzeo en Dresden** estas ekspozita. Tiu ĉi germana muzeo kolektis en la lastaj jaroj ne nur materiale, sed ankaŭ teknike tute novajn aranĝojn kaj aplikis el ili la plej modernajn eltrovaĵojn de la tekniko. En tiu ĉi salonego nun estas videblaj ĉiuj organoj de la homa korpo kun siaj funkcioj kaj taskoj. La plej brila peco de la tuta ekspozicio estas la **„vitra homo“.** Sur vera homa skeleto estas en travidebla maso aranĝita la organoj de la homo inkluzive de la vejnoj kaj arterioj, ĉio en ĝusta ordo kaj natura grandeco. La prezentado de la „vitra homo“ montras ĉiun apartan organon lumigita de interne. Je la fino de tiu ĉi ekspoziciparto troviĝas materialo pri la fiziologio de la nutrado kaj pri la Aŭstria nutradpolitiko, kiu per tio transirigas al la granda sekcio pri la **nutrado.**

La ekspozicio pri la nutrado komencas per prezentado, kiel oni gajnas la farunon kaj panon. La sekcio estas jene konstruita: 1e) klarigoj pri la nutrovaloro, digestebleco kaj taskoj de la nutraĵoj; 2e) montro de la plej gravaj produktpolitikaj faktoroj en Aŭstrio; 3e) varbo por la pliigo de la konsumo de l'koncernaj nutraĵoj kaj fine prezento de la nutraĵoj en naturo.

Aldonita al tiu ĉi sekcio estas ekspozicio de firmoj, kiuj montras Aŭstriajn industriajn kaj meti-produktojn sur la kampo de la higieno, kiuj estas rigardindaj kiel veraj kvalitprodukoj.

Grava kampo por la konservado de la popolsaneco, la flegado de la **dentoj,** havas elstaran situon proksime al la honorloko, kaj oni vidas tie la valoron de la buŝpurigado ĉe infanoj, gejunoloj kaj plenkreskintoj. Alligita estas kvalitekspozicio pri la ĥemi-farmaciaj kaj aliaj produktoj.

En la unua etaĝo super la ekspoziciejo pri la homo kaj liaj organoj la ŝtata ligo de **Socialasekuraj Instancoj** prezentas detalan superrigardon pri siaj faroj sur la diversaj kampoj. Alligite **Aŭstria Gimnastik- kaj Sport-Fronto** aranĝis interesan montraĵon pri la Aŭstria sportagado sur la diversaj sportkampoj kaj pri la sukcesoj de la Aŭstria sportularo. De ĉi tie oni atingas ĉambron, kie estas montritaj la sciencaj rezultatoj de la **esplorado** de nia klimato kaj de niaj **naturaj kuracfortoj** en akvo, suno kaj aero.

La Higien-ekspozicion partoprenas ankaŭ **Federaciaj Fervojoj,** kiuj laŭ la principo „Sana kaj sekura vojaĝado en Aŭstrio“ klopodas eviti sandifektojn ĉe la transporto de varoj kaj eĉ en la starigo de la veturprezoj akcelas refreŝiĝon kaj sanecon.

Kinoprezentadoj, koncertoj, prelegoj kaj kuirdemonstroj kompletigas la ekspozicion kaj faras ĝin pli alloga.

Tiel la Viena Higien-ekspozicio, ampleksanta la tutan homan vivon, montriĝas pruvo de la progresemo kaj vivoforto de nia Aŭstria popolo. Aŭstrianoj kaj eksterlandanoj, vizitu la Higien-ekspozicion en Wien en la monato **junio 1937!**

Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio.

Por forigi eblan konfuzon la Akademio sciigas, ke la **Oficialaj Lingvaj Institucioj** tute ne okupiĝis kaj sekve neniel respondecas pri la verko de ĝia aŭtoro titolita: **Oficiala Vortaro de Esperanto,** publikigita de s-ro Grenkamp-Kornfeld.

Robert Hohlbaum:

El „Reĝo Popolo“.

Romano el la franca revolucio.

El baldaŭ aperonta unua volumo de **„Aŭstria Antologio de la 20a jarcento“.**

En la koridoroj kaj ĉeloj amasiĝas la mortintoj. Oni pelas la vivantojn en la korton de la malliberejo. Alten elstaras la muroj, super ili, malproksime, sensente la steloj, proksime, en voĉo kaj flameco intima, la feno.

El la homamaso elstaras senpasie maldika, nigra figuro. La homoj konas lin, li estas la advokato Scipio Légendre, ho, ili lin bone konas. Li loĝas meze inter ili, li ofte estis helpanta ilin per konsilo kaj ago, kiom sagaca, krima riĉulo ilin volis trompi kaj skarifi. Li nur levas la manon kaj jam la homoj eltrenas tablon, seĝojn kaj benkojn. Poste li rigardas ilin tra siaj okulvitroj el tranĉilakraj okuloj, demandas ilin, ĉu ili ne scias, ke ili estas juĝistoj, juĝistoj, ke la suverena popolo havas la plej altan potencon super vivo kaj morto, sed ke ĉie devas esti ordo kaj la ĝusta formo!

Li eksidas ĉe la tablo, li nomas ses helpantojn, kiujn li vokas al sia flanko, kaj ordonas: „Oni voku la akuzitojn antaŭ la tribunalon de la popolo!“

Ha, tio estas nova, bela ludo! Unu post la alia el la malbenindaj aristokratoj iras antaŭ la juĝistojn. Al ĉiu estas permesate sin defendi. La unu silentas. Timo kuntiras lian gorĝon.

„Per cia silentado ci konfesas cin kulpa!“ diras Scipio Légendre. Unu mannovo, li estas forkondukata flanken, baldaŭ lia kriado akre sonas el la malhelo. La dua balbutas en konsternita timo. Ho, oni ensorbas ĉi tiun timon kiel vinon!

Vinon! Vinon! Jam ruliĝas la bareloj. Ilin pagas la bona sinjoro, kiu staras en la angulo de la korto kun krucitaj brakoj; la trajtoj estas en plena ĝuado, sed la okuloj brilas, la duonmalfermitaj lipoj malsekete briletas, kelkafoje antaŭen rampas la malgranda pinta lango, kiu memorigas pri serpento. Se la mortokrio estas soninta tre bele kaj akre, la manoj donas senbruan aplaŭdon kaj li klinas sin antaŭ la homoj. Jes, li klinas sin antaŭ la popolo, antaŭ sia reĝo. Reĝoj ili ĉiuj estas! La aristokrata kanajlo, kiun oni jus alkondukas, ĉu li do submetos sin? Unu puŝas la pugnon en lian nukon tiel, ke li antaŭen falas, sed per ĉiu forto li denove suprenstarigas sin.

„Malsupren, malsupren! Kaj nun defendu cin! Parolu ci! Ĉu ci do parolos? Ĉu ci do malfermos cian grimacitan buŝaĉon?!“

La lipoj restas mokege, mallarĝe premitaj.

Muta gesto de Scipio Légendre. La nobelulo estas forkondukata. Ili puŝas la lancon tra lia brako, tra la brusto, ili tranĉmalfermas lian ventron. Neniu tono. Silente li mortas. En furioza kolero ili piedpremas lian vizaĝon, profanas la kadavron, hisas abomenindajn trofeojn sur lancoj kaj sabroj.

Scipio Légendre ne vidas tion, li ne aŭdas timkriadon kaj furiozkriegon, tio ĉio estas tiel negrava kaj ne povas interrompi la ofican agadon. En la torĉolumo li ekzamenas la listojn pri la malliberuloj, vokas la nomojn, donas tute flegme ĉiam en la sama tono demandon post demando.

Sed en la oreloj de la aliaj la mankanta mortokrio postlasis doloran mankon. Ankaŭ ilia stomako estas malforta kaj malplena, je diablo, ne estas bagatelajo, ĉi tiu popoltribunalo, laciga laboro ĝi estas! Ili enversegas glason da vino, denove sentas varmon kaj firmecon.

—

Ha, tio estas io alia, la juna virino ĉi tie, ŝi sin ĵetas sur la genuojn, plorkriegas kaj petegas pro sia vivo, la ringoj sur la freneze agantaj manoj ekbrilas en la torĉolumo, laboristo el St. Antoine ilin tiras de ŝiaj graciaj fingroj. La severaj okuloj de Scipio Légendre lin kaptas, li devas meti la ringojn sur la tablon, ili apartenas al la popolo. La juna laboristo volas rediri, ke ja ankaŭ li estas la popolo, sed la okuloj fulmas tra la okulvitroj, la mano leviĝas ordone. Kiam ĝi denove prenas la listojn, kiam la palpebroj alfundiĝas en la vico de la nomoj, la „sansculoto“ kaptas la juvelojn, malaperas en la malhelo.

Tri fiuloj fortrenas la kriantan sinjorinon. Ŝia kriegado kreskas al freneza forto. Envere, kiel oni do sentas la propran vivon centfoje meze en la mortado! Ankoraŭ glason!

„Vivu la nacio!“ La krio fariĝas sono. Fariĝas kanto. Kanto de Silvain Légendre.

„Silenton!“ krias Scpipio. Daŭrigas legi. Nomon post nomo. Demandon post demando. En la ventmovata torĉolumo kreskas, malkreskas kaj kreskas lia ombro. Ĉiuj ombroj kreskas, malkreskas, rekreskas en la fantoma ludado. Ankoraŭfoje Scipio Légendre ordonas silenton. La bruo formuĝas. Silente rapidmoviĝas la ombroj. La vento parolas. Malproksime super ĉio la steloj.

Trad. Hugo Steiner.

INFORMOJ EL AŬSTRIO

Remorajo al kanceliero Dollfuss.

La ĉefredaktoro de A. Reggel en Budapest publikigis okaze de la vizito de la Aŭstria Federacia Prezidanto Wilhelm Miklas jenan intervjuon, kiun li havis kun la Aŭstria Kancelerio d-ro Dollfuss la 16. marto 1933, ĝis ne publikigitan, dum kiu d-ro Dollfuss diris laŭvorte: „Ekzistas ideoj, por kiuj suferi estas altega devo kaj por kiuj morti signifas martiran morton. Stürgkh (aŭstria ministroprezidanto, murdita en 1916) mortis pro la monarkio, Seipel (Federacia Kanceliero) antaŭ Dollfuss, alpafita de politika kontraŭulo) pro tio, ĉar li estis geniulo, la plej nobla intelektulo en nia jarcento. Estas eble, ke ankaŭ mi mortfalos en ĉi tiu giganta David-Goliath-luktado de la 20-a jarcento. Sed se mi estos falinta, tiam mi jam havas mian sekvulon. Schuschnigg (la nuna Federacia Kanceliero) estos mia posteulo, se mi iam malaperos el tiu ĉi mondo. Li ankoraŭ estas pli forta kaj pli energia ol mi. Li estas reprezentanto de la pensmaniero de l' german-aŭstria katolikismo, de nefleksebla kredo, de honesteco, de l' nacia sentado, de l' kulturita homo kaj de la demokratio. Ni ambaŭ estis disciploj de Seipel kaj restis liaj fidelaj kaj respektplenaj disciploj, unu animo en du korpoj.

(Laŭ „Reichspost“, 4. V. 1937.)

Kancelario de
Federacia Prezidanto
6208

Wien, la 15. de majo 1937.

Al la gvidanto de Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio en Wien.

Vi havis la afablecon, sendi al sinjoro Federacia Prezidanto ekzempleron de n-ro 4 de la jurnalo „Aŭstria Esperantisto“ kun bildo de la naskiĝdomo de sinjoro Federacia Prezidanto.

Sinjoro Federacia Prezidanto deziras esprimi al vi sian plej bonan dankon por la ĝentilajo, farita al li per tio.

La Kabineta Direktoro: Huber.

La Prezidanto
de Aŭstriaj Fervojoj

Wien, la 15. de majo 1937.

Tre estimata sinjoro kortega konsilisto!

Mi ege ĝojas pri la publikigo de la aranĝoj, estontaj intencataj de Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj, en artikolo de la gazeto, gvidata de vi, kaj mi petas bonvolu akcepti mian plej sinceran dankon por tio kaj ankaŭ pro via afabla preteco, ankaŭ estonte varbi en la intereso de Federaciaj Fervojoj.

Kun la esprimo de mia plej alta respekto.

F. Stockinger.

Aŭstrio. Ĉi tiu unu vorto sur la belaspekta kolora kovrilo ambaŭflanke kun la neĝkovritaj montoj en la fundo kaj — sur la titolpaĝo — puto kun sanktula figuro antaŭ ĉarma vilaĝo kaj — sur la dorsflanko — gracia vilaĝanino ĉe la puto — estas por ni aŭstrianoj nia tuta mondo; ĝi signifas nian hejmlandon, kiun ni deziras montri al niaj amikoj en alilandaro. Kaj la 42-paĝa libro kun siaj 45 bildoj kaj bela landkarto en la mano de esperantistoj devigas ilin, veni al nia lando por rigardi la belajojn, kiujn nur povas aludi la gvidlibro. Oesterreichische Verkehrswerbung (Varbadservo de Ministerio por Komerco kaj Trafiko) jam depost 1928 ĉiujare — sed ĉiam ankoraŭ pli bele — eldonis ĉi tiujn propagandilojn, kiuj trovis ĉiam bonan akcepton inter la esperantistaro tutmonda. Kaj speciale ĉifojon ni ĝoju, ĉar la eldonanto komencas la libron per artikolo „Aŭstrio — la Esperanto-lando“. Esperantigis Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio, Wien, I., Neue Burg.

Tiu varbiloj estas havebla kontraŭ resp. kupono ĉe Int. Esperanto-Muzeo, Wien, I., Neue Burg.

Duko de Windsor en Appesbach ĉe Wolfgang-lago.

Kion la duko manĝas.

Unua matenmanĝo: Inter 10 h 30 kaj 11 h 30 teo kaj „Toast“, do ne laŭ angla maniero. Ne ekzistas lunĉo aŭ, kiel ni aŭstrianoj dirus, tagmanĝo. Du aŭ tri horojn poste denove teo, krome manĝaĵo kaj pomoj. Je la 5 h posttagmeze teo kun kukaĵo kaj je la 9 h supo, fiŝo, unu aŭ du viandaĵoj, farunaĵo kaj fromaĝo. Al tio aŭstria blankvino aŭ Burgund-vino. Ke la duko preferas Viena „Schnitzl“, kuiritan legomaĵon kaj ĉasaĵon kiel ankaŭ „Sacher-torton“ estas konate.

Kion faris la duko poste?

Post la vespermanĝo je la 10 h la duko restis sola, ne havis radio-aparaton, telefonis per speciala linio, skribis leterojn, legis kaj post meznokto ekludis sakfajfilon kaj ĉiam nur malmultajn skotajn melodiojn. Kontraŭ la dua matene li ŝanĝis la sakfajfilon kun tir-harmoniko kaj ludis Vienajn kantojn „En Prater ree floras la arboj“, „Mi ree devas esti en Grinzing“, „Tie en Sievering ...“, sed ankaŭ seriozajn melodiojn preskaŭ nur el Aŭstrio, ekz. de Mozart kaj „Silente petegas miaj kantoj“ kaj de Kreisler „Amoĝojo, amodoloro“.

(Laŭ Volkszeitung, R. B.)

Disrompo de la neŭtrala movado.

„Esperanto“-Genève sub la titolo „La disrompo de la neŭtrala movado“ publikigas i. a. gazetartikolon, apertintan en Viena gazeto, sub la titolo „Komunistoj malhelpas la transporton de la E.-biblioteko al Vieno“ kaj demandas sub punkto 7 jenon: „... ni publikigis la tekston de gazeta informo, aperinta en tagaj gazetoj. Kaj kun ĝi letero de s-ro Hofrat Steiner, Vieno. La konkludon pri tio ni lasas al la legantoj. Ni demandas tamen s-ron Hofrat Steiner, ĉu li inspiris la artikolon kaj se jes kie troviĝas la komunistoj, ĉu en la estinta komitato de UEA, forkurinta antaŭ simpla plendo de kelkaj membroj, aŭ inter la protestintoj. Valorus ankaŭ scii, de kie venas la ideo, ke la decido de la tribunalo estas nur provizora. Se necesas tiaj rimedoj por konvinki dubeman publikon tiam la afero ja devus stari malbone.“

Sekvis la gazetartikolo „Komunistoj malhelpas la transporton de la E.-Biblioteko al Vieno“, poste mia letero, en kiu mi precize klarigis, ke mi estis surprizita, kiam mi atentigis min pri la artikolo, kaj ke mi tuj altelefonis la redaktoron kaj postulis ĝustigon, kiu aperis la sekvintan tagon.

Post tiu letero kaj la ĝustigo en la sama jurnalo mi ricevis de s-ro Cech en Vieno, ĉefdel. de UEA, leteron de dato 20. I. 1937: „Kiel ĉefdel. de UEA mi dojas pri la rapida presigo de la ĝustigo de la absurda artikolo de „Weltblatt“, kio treege faciligas mian funkciadon.“

Du E.-gazetoj publikis artikolon pri ĉi tiu afero kaj post informo la unua publikigis senkulpigan artikolon kaj pri la dua mi ricevis jenan leteron:

Kara Prezidanto kaj Amiko!

Jus reveninte el Brazilo mi ricevis vian leteron. Mi tuj transdonos leteron al

Bad Alt-Aussee en Stirio.



d-ro Rosenstock, nuntempe redaktanto por ĝustigi la artikoleton de 37. nro.

Okaze mi forte premas vian manon kaj kisas ambaŭ viajn vangojn. Via ĉiam O. Bujwid.

Mi ne estas batalema kaj pro tio mi ankaŭ deziras, ke estu trovota vojo por iela interkonsento inter UEA. kaj IEL. Sed mi pensas, ke tiu artikolo ne estis la ĝusta preparo. La demandoj, faritaj al mi, respondiĝas per si mem, sed mi deziras ankoraŭ aldoni, ke mi kompreneble nek inspiris nek verkis la artikolon pri „komunistoj en UEA“. Tion tre bone scias ankaŭ UEA. Steiner.

Esperanto kaj Bellamy.

En la sama tempo, kiam en Eŭropo d-ro Zamenhof publikigis sian lingvon kaj skribis pri la „interna ideo“ de Esperanto, vivis en Ameriko Edward Bellamy verkinta libron pri nova ekonomia sistemo, ankaŭ bazita sur humanismo, frateco kaj internacismo kaj en kiu li profetas la uzon de mondlingvo.

En sia verko, baldaŭ eldonota en Esp., Bellamy skizas bildon de la socio en 2000-a jaro, kiam ĉiuj anoj de la nacioj havos la samajn rajtojn sed ankaŭ egalajn devojn, kiam ne plu ekzistos senlaboreco, mizero, ekonomiaj krizoj, kiam anstataŭe la granda teknika kaj scienca progreso pruviĝos esti beno, ebliganta al ĉiu senzorgan vivon.

La sistembazo estas ekonomia egaleco de ĉiuj dum la tuta vivo.

La nuntempa evoluo de tekniko kaj scienco ebligas abunde provizi la tutan homaron je ĉiuj bezonaĵoj per minimuma laboro, sed la ekzistanta ekonomio, bazata sur konkurenco, profito, nepersona mono, nekontrolata produktado ktp. kaŭzas, ke al milionoj da homoj mankas la necesaj vivrimedoj, dum aliflanke grandaj amasoj da varoj estas detruataj, ĉar ili restas nevendeblaj.

La ruinigaj konsekvencoj de la nuna sistemo povas malaperi nur, se la produktado estas regulata laŭ la kolektiva bezono de la homaro, ĉiu ricevante egalan porcion kaj farante sian parton de la komuna laboro; nur tiam povos komenciĝi daŭra prospero por la tuta homaro.

Internacia Asocio „Bellamy“ (IAB) uzas E-on por sia propagando, estas neŭtrala rilate politikon kaj religion kaj ĝiaj anoj apartenas al ĉiuj klasoj.

Informojn: IAB, sekretariejo Gerard H. Bosma, Kerkweg 152, Santpoort, Nederl.

Esperanto en Norvegujo.

Originala raporto.

Komence de marto Cseh-instruistoj ges. Weide venis al Norvegujo kaj sukcesis starigi kursojn en diversaj lokoj kun 175 pers., el kiuj la plej multaj estas infanoj. 60 estas skoltoj, el kiuj multaj vojaĝos al la Jamboreo.

La sukceson inter la skoltoj ni dankas al s-ro Berggreen, Sandefjord.

Plenkreskuloj, skoltoj, ge-infanoj deziras korespondi. Skribu al s-ro Berggreen, kiu peros la korespondaĵojn.

Originala raporto el Grekujo.

Konstanteno Stefanakis, Athen.

Pri la disvastiĝo de E. en la ĝendarmeriaj rondoj mi ne estas kontenta pro la fakto, ke multaj oficiroj kontraŭbatalas ties disvastiĝon. Spite tiu fakto mi sukcesis helpe de s-ro A. Stamatiades varbi en nia ideologio kelkajn el miaj kunstudantaj kamaradoj en Ĝendarmeria Altlernejo, Estas ankaŭ kuraĝige, ke la tre respektata kaj estimata prezidanto de Helena E.-Asocio d-ro Stamatiades sukcesis akiri la aprobon de la ĉefo de la ĝendarmeria korpuso, generalo D. Drosopoulos por fari kelkajn prelegojn pri la utileco de E. La prelegoj multe impresis miajn kamaradojn.

E.-movado en Jugoslavujo.

Jam longe antaŭ la milito E. trovis ĉe ni adeptojn, precipe en Kroatujo kaj Serbujo, sed ankaŭ Slovenujo ne postrestis, Aperis E.-gazeto. Ljudovit Koser verkis la unuan E.-gramatikon. Post la mondmilito en preskaŭ ĉiuj iom pli grandaj urboj E.-kluboj ekkreskis, centro fariĝis Zagreb, kie ankaŭ okazis la 1. Nacia E.-kongreso. Oni denove eldonis lernolibron en kroata kaj slovena lingvoj.

Lastjare okazis la 9. E.-kongreso en Ljubljana kun granda sukceso. Instruista sekcio kaj katolika ligo, de mi estrata, fondiĝis. Ankaŭ ekleziaj rondoj ekrekonas E-on. Mi nur menciu episkopan moŝton d-ron Gregorius Rozmann, protektoro de Katolika Ligo.

Golobič Peter.

EL LA LEGANTORO:

„Ni ripetas nian peton, ke vi klopodu, ke vi en aŭtuno denove gvidu Radio-kurson sed en la fruvesperaj horoj, kaj dankas al vi plej bone por via tiom peniga laborado ĝis nun kaj esperas, ke per via plua laborado en la E.-movado, ampleksanta la tutan mondon, ni atingos tiun celon, kiun ni fiksis por ni kaj por la utilo denia lando Aŭstrio. Ni deziras al vi plej ŝatata s-ro kort. kons. plej bonan sanon kaj prezentas la plej korajn salutojn. A. Sassmann, lokomotivestro, Linz (sekvas 31 subskriboj).“

„Vian gazeton mi ĉiam legas kun intereso kaj plezuro. Plej korajn gratulojn pro ĝia bela aspekto kaj pro via aktiveco. Pro Radio Wien (novaj kursoj en aŭtuno) mi skribas hodiaŭ al la aŭstria ambasadoro en Paris.

Aglave, Radio-Club Esperantista, Paris.“

„Do s-ano Steiner ni scias, ke vi progresos por tut-mond-gesamideanoj. Ni atendos aŭs-



Bad Gleichenberg en Stirio.

kulti E.-kurso el Radio Wien aŭtune. Dimiter I. Iliev, Rahovo, Bulgarujo."

„La ideo, eldoni adresaron de nuna samideanaro, estas bonega, kaj ĉiuj el ni dankos al vi pro via entreprenemo, ĝuste en tempo malĝojiga pro disiĝo de niaj eminentuloj kaj ĝojigo pro la tamen glora jubileo de Esperanto. Karger, Amika Rondo, Zwittau-Svitavy."

„Tralegante vian ĵurnalon mi trovis multon, kio min ege interesis." E. Hart, Sydney, Aŭstralio.

„Bonvo'e akcepti mian dankon kaj gratulon pri la libro ‚XII-a Somera Universitato', kiu estas kaj alloga kaj interesa. Speciale mi ĝuis la artikolon de Kalocsay." E. J. Bengough, Hamilton, Kanado.

„Rilate al la enhavo de AE mi nur povas gratuli. Ĝi vere meritas laŭdon." Hans Zant, Steinakirchen a. F.

„Vian ĵurnalon mi kun plezuro legas. Ĝi estas tre interesa." F-ino Cordier, Saint Rafael.

„Mi deziras esprimi denove mian ĝojon pro la bela gazeto ‚Aŭstria Esperantisto'. Tiu gazeto montras vojon irendan. Per tiaj gazetoj, tiom bonege dissendataj, la homoj reciproke komprenas kaj amas siajn homfratojn. Per via gazeto vi en la aŭtuno havos egan aŭskultantaron. Estas tute simple la devo de Radio-Wien ekkoni la valoron de via kultura laboro, kiu ja unuavice servas al Aŭstrio.

Via alvoko por la Adresaro havu bonajn fruktojn. La nunaj adresaroj estas tro malsufiĉaj. Ĉu vi zorgis, ke la alvoko staros en ĉiuj Esp.-gazetoj de la mondo?

Ĉe-instruisto A. Weide, Tönsberg."

„La enhavo de AE estas tre interesa kaj tute kontentiga. La temoj, pritraktantaj la civilizacion, teatroarton, skolt-movadon, turismon k. a. de via progresema kaj prospera lando ĉarmas kaj plezurigas la gelegantaron.

La oficiala subteno, kiun trovas E.-movado en la bela kaj alt-civilizita Aŭstrio flanke de la aŭtoritatoj igas ĉiun esp-iston fidi firme je baldaŭa efektiviĝo de nia altcela ideal o." Konst. Stefanakis, Ateno, Grekujo.

„Via bela gazeto tre plaĉas al mi." A. Ferd. Sih, Lobito, Angola, Afriko.

„Mi kaptas la okazon por denove gratuli al vi pri la bonega aspekto kaj ĉiam tre interesa enhavo de AE, preskaŭ luksa revuo kaj internacia, kiu enviciiĝas en la plej gravaj organoj de nia movado.

Jam de longe mi klopodas al pli kaj profunda kono de l' simpatia aŭstria popolo, sed nun mi ĝojas, ĉar dank' al AE multe faciliĝas kaj agrabliĝas la tasko.

Emociite mi legis en nia presaro la elokventajn raportojn pri via altvalora laboro por Esperanto. Fiere la esperantistaro povas citi vian tute imitindan agmanieron inter la eminentuloj, kiuj sen moktimo plene sin dediĉas por la Granda Ideo." Cafonnette Camille, Walcourt, Belgujo.

Sendu artikoletojn, ĝenerale interesajn pri via lando kun foto por publikigo en nia gazeto.

POR KOMERCISTOJ:

Eksporto kaj importo de varoj.

S-ano **A. Schidloff, Wien,** II., Kleine Mohrengasse 4, informas, ke en Aŭstrio estas bezonataj fokopeltoj krudaj, ne tanitaj, ĉiuspecaj el Nordaj Ŝtatoj (Danujo, Islando); peltoj de vulpoj, sciuroj (Feh) kaj aliaj en kruda stato el Finnlando, Estonio ktp. Vulpopeltoj krudaj kaj aliaj el Kanado. Oni pagos kontantan monon.

Gordon-G. m. b. H., Dresden dissendas E.-cirkulerojn pri „Gordon-motoro".

EL LA MONDO

Esperanto-Esperanta Vortaro.

Por honorigi la 50-jaran jubileon de Esperanto en Sovet-Unio oni preparas tie vortaron, pli kompletan ol la eldonita vortaro de SAT.

Internacio de Militrezistantoj okazigos 23.—26. julio konferencon en Kopenhago. Informojn de War Resisters' International 11, Abbey Road, Enfield, Middlesex, Britujo.

Ĉinujo: „Ĉinio hurlas", monata informilo de Mondkultura Asocio en Shanghaj novaperigis en nova serio sian unuan numeron.

ČSR. Mondfama kuracbanloko Karlbad, kies vicurbestro s-ro Ullrich estas nia samideano, invitas per 16-paĝa belege ilustrita faldprospekto al vizito. „Rimedo por junigo, plena de eternaj forto kaj freŝeco estas la 16 mineralfontoj."

Estonujo. Ŝlim- kaj markuracloko uressaare en Saaremaa sur insulo Oesel. 8-paĝa gvidilo kun belaj bildoj kaj landkarto, kiu montras, ke la vojo ŝipe de Riga, Pärnu, Haapsalu kaj Tallinn ne estas longa. Se mi konsilu: Ĉiu almenaŭ unufoje venu al Estonujo; la maro estas bela, interesaj rememoroj al antikva historiaĵoj, bona manĝado malmultekosta kaj tre bonaj, honestaj kaj agrablaj homoj. Kiel estrarano de IEL mi pensas, ke oni por la jaro 1939 eventuale kongresu tie, kie la movado estas tre vigla. St.

Francujo. „Le Journal d'Amiens" kaj „Le Progres de la Somme" publikigas la E.-Radiosendadojn.

Nederlando. La mondfama lernejo „Werkplaats" en Bilthoven enkondukis E.-on en sian instruplanon.

Polujo. Esperanta Oficejo Gazetara (Antoni Pisarski-Woydakowski, Warszawa, poŝtkesto 408), post mallonga tempo aperos, estos sendata al redakcioj kaj ĵurnalistoj senpage. Sendu E.-gazetojn kaj novaĵojn.

USSR. Sovetunia Blindula Asocio eldonis brajle (reliefpunkte) en Esp. la duan almanakon pri la vivo de la sovetaj blinduloj kun literaturaj verkoj de blinduloj. Ĝi ankaŭ eldonis lernolibron de Rublov.

Recenzoj.

„100 pikantaj panŝmiraĵoj", kolektitaj de d-ro M. Topolansky, kompletig. kaj eld. de kuirejestro Franz Ruhm, elgermanigis d-ro H. Sirk, lektoro de Esperanto, Wien 193[illegible] ŝ 1.20.

La eldonejo okupiĝas pri eldonado de libroj pri kuirarto kaj ĝis nun faris tion nur en la germana lingvo. Nun ĝi faris la unuan provon en Esperanto. Se sufiĉaj mendoj venos, la eldonejo daŭrigos la eldonadon de E.-lakverketoj. Sur 42 paĝoj vi konatiĝos kun multaj bonaj, malmultekostaj manĝaĵoj. La kovrilo estas de Kora, kiu dum la 28-a kaj katuris diversajn. E.-komitatanojn.

Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris.

„Gvidilo tra la Esperanto-Movado" de G. P. de Bruin, 2. pli ampleksigita eld., 80 pĝ., 14 je 20 cm, 1936; prezo fr. fr. 5.50 plus 10% afranko.

Ĉi tiu eldono estas ĝisdata kaj enhavas la E.-okazintaĵojn ĝis okt. nj. en la socialista movado. Tre interesaj la unuopaj ĉapitroj.

Stjepan Mišak, Giritli Mahallesi 110, Adana (Turkujo).

Aperis la 5. volumeto de „Tra Mistera Orienta aŭ Miaj Memoraroj". Prezo de ĉiu unuopa 36 paĝa malgrandformata volumeto nur 1 resp. kup. Mendu!

Anoncoj.

Anoncoj havas plej bonan efikon, ĉar la gazeto eliras al 122 Landoj; 2-linio ŝ 2.—, ĉiu plua linio ŝ 1.—.

Estas kompreneble devo, respondi ricevitajn korespondaĵojn!

Peto.

Por ebligi la resaniĝon de blinda juna fraŭlino en Svisujo, la esperantistaro estas petata sendi iun kvanton da poŝtmarkoj donace. Ni bezonas 1 milionon kaj jam posedas 300.000. Urĝas! Por la helpkomitato: P. J. W. Schilperoord, Berkelselaan 43b, Rotterdam-N.

Kontraŭ internacia respondkupono!

Bonaj lernolibroj, belaj legolibroj (Andersen, Tolstoj) en Esp. senpage kontraŭ 1 resp. kup.; kontraŭ 2 pluaj libroj. Prof. d-ro Schramm, Tübingen, Germanujo.

Du 20-jaraj studentoj biciklos dum la dua duono de julio tra Aŭstrio, propagante E-on. Sur la bicikloj flugetos la verda stelo. Ni deziras viziti s-anojn kaj grupkunvenojn, dum kiuj ni povos rakonti pri nia veturado. Ni povos ankaŭ montri kartojn el ĉiuj kontinentoj (eble per epidiaskopo). Skribu al Alois Hochreiner, Linz a. D., Harrachstraße 7. Senpaga noktigado dezirata.

Literatura Mondo, Budapest, IX., Saroksári ut 38—40 V 6.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: **Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg,** Bundesstraße 154. — **Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer", Wien, VII.,** Bandgasse 28.

Die zweite Sprache für Alle

Deutscher Teil der Zeitschrift „Oesterreichischer Esperantist"

Mitteilungsblatt für die Mitglieder des Oesterreichischen Esperanto-Bundes

Nr. 6 (21) Juni 1937

Schriftleiter: Hofrat Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg
Konto bei der Postsparkasse D-123.826

Aus dem Geleitworte des Bundeskanzlers Dr. Kurt Schuschnigg an die Zeitschrift „Der österreichische Esperantist":

„Der Esperantistenbewegung und ihren Mitgliedern als Pionieren auf dem Wege zur Befriedung der Völker wünsche ich allen Erfolg für die Zukunft. Sie haben ein Anrecht darauf, daß die Oeffentlichkeit ihrer stillen und doch so fruchtbaren Arbeit mit Interesse begegnet."

Die Erfahrung hat gezeigt, daß bei Kursen, in denen bald mit dem Lesen einer E.-Zeitung begonnen wurde, große Fortschritte erzielt wurden und daß diese Schüler auch bei der Stange blieben.

Obwohl nun der „Oesterr. Esperantist", die Zeitung der offiziellen österreichischen Landesorganisation „Oesterr. Esperanto-Bund", sehr viel einfache Aufsätze bringt, so dachten wir dennoch daran, noch ein Bindeglied einzuschalten, die „2te Sprache für Alle", die von der nächsten Nummer an auf ungefähr drei Seiten Uebungs- und Lehrstoff bringen wird, der nicht nur den im Studium des Esperanto Stehenden, sondern auch jenen, die einen Anfängerkurs beendet haben, Freund und Helfer sein soll. Er wird auch allen Esperantisten so manches bringen. Damit hoffen wir viele neue Freunde dem Esperanto zu gewinnen und zu erhalten!

Das vierseitig gedruckte Blatt wird für das 2. Halbjahr 1937 (fünfmal) mit Postzusendung 40 g (in Briefmarken), für 1938 (elfmal) nur 80 g und für die Zeit von Juli 1937 bis Ende 1938 S 1.15 kosten. Kursleiter und Besteller von mindestens 10 Stück je 25, bzw. 50 und 75 g.

Das billigste Werbemittel, das billigste Unterrichtsmittel!

Benützet es!

Aus aller Welt.

Brasilien. Das offizielle Führerbuch der 9. Intern. Mustermesse in Rio de Janeiro enthielt Aufklärungen auch in Esp.

Dänemark. 15 Radio-Zeitungen veröffentlichen regelmäßig die Esperanto-Sendungen von den verschiedenen Stationen.

England. In Sheffield erhielten die Trambahn-Bediensteten von der Stadt die Erlaubnis, das Esperanto-Abzeichen während des Dienstes zu tragen. Der Gruppe gehören 200 Trambahner an. In Wien wurde zuerst in der ganzen Welt bei der Trambahn eine Armbinde mit dem Esperanto-Stern eingeführt, das während der Messe und bei sonstigen Fremdenverkehrsveranstaltungen getragen wird.

Frankreich. In der Tageszeitung „Lyon Républicain" erscheint Dienstag ein Esp.-Kurs.

Tschechoslowakei. Die tschechische Kindererziehung „Kulišek" in Brünn bringt wöchentlich einen Esp.-Kurs von J. V. Šamla, Schauspieler der Radiostation Brünn.

Ungarn. Das Parlamentsmitglied Josef Petajnek in Budapest wurde Vorsitzender der ungarischen katholischen Esperanto-Landesorganisation.

La E.-kursoj en **„Reichspost"** kaj **„Das Kleine Volksblatt"**, kiuj daŭris dum 32 semajnoj ĉiudimanĉe, nun finiĝis. La gvidinto kort. kons. Steiner ricevis de ambaŭ ĉefredaktoroj Ŝtatkonsilisto d-ro Funder kaj Vicprezidanto de Gazetara Ĉambro Mailler dankleterojn pro bona kunlaboro. Dume d-ro Funder („Reichspost") skribis, ke li estas ĉiam preta helpi al nia movado sed nuntempe pro manko da spaco ne povas instali E.-rubrikon, ĉefred. Mailler („Das Kleine Volksblatt") konsentis, daŭrigi la laboron por E. per disponigo de spaco por E.-rubriko, aperonta ĉiudimanĉe. Ni petas, legu „Volksblatt", ĝi publikigos ĉiam novajojn, kiujn vi povos uzi por via loka gazetaro.

IEL-Junularo.

La gejunularo estas nia estonteco! Tial mi intencis fondi IEL-Junularon kun la sidejo en Wien. Ĝi ampleksu gejunulojn inter 14—21 jaroj. La statutoj por Aŭstrio jam estas ĉe la registaro kaj mi atendas ilian baldaŭan sankcion flanke de la Aŭstria Registaro.

La detaloj estos publikigataj en la venonta numero. Tiam ni fondos tuj la organizon por Aŭstrio kaj sendos detalojn por aliĝo al la aliaj landoj.

IEL-Junularo estos aparta fakorganizo, aliĝinta al IEL, kaj helpos en multaj aferoj al la landa organizo kaj per tio al IEL.

Por **Aŭstrio**: Kiu deziras helpi en la organizado? Temas pri jam spertaj s-anoj, kiuj amas la junularon kaj deziras, esperantigi kaj organizi ĝin! Do tiuj ges-anoj, kiuj deziras fariĝi aŭ **Landa Gvidanto** (por la unuopaj Federaciaj Landoj) aŭ **Grup-Gvidanto** skribu al mi.

Kort. kons. Steiner, Wien, I., Neue Burg.



Parto de la unua estonta grupo en Linz, kiu kun la iniciinto de la ideo postinspektoro Kugler-Linz bicikle veturis al la E.-kongreso al Krems. Meze kort. kons. Steiner, post-insp. Kugler, f-ino Gothmann.

Internacia Esperanto-Ligo
ĉefdel. G. Weber, Wien, I., Neue Burg.

Nia **bela jarlibro** estas havebla kontraŭ pago de S 5.— (AEA.-membroj nur 4.40) por membroj kun jarlibro, 12.50 (AEA. 11.95) por MA. (kun jarlibro kaj monata gazeto), S 24.— (AEA. 23.45) por MAH (jarl. kaj semajna Heroldo).

Mi **petas** la s-anojn, kiuj ne ankoraŭ pagis, **ordigi** la aferon, kaj **invitas** la ne ankoraŭ aliĝintajn **aliĝi!**

En multaj ni **devas instali delegitojn**, por ke **Aŭstrio ne postrestu aliajn landojn!**

La belegaj **IEL.-sigelmarkoj**: 50 kun afranko 65 g, 100 S 1.25.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Reg.-Rat Fritz Stengel
Wien, XVII., Syringg. 3.

Oficejo kaj kunvenejo: Lehrerhausverein, Wien, VIII., Josefsg. 2, part. Parolhoroj de la estraro merkrede 19—20 H. Venu, vi estas kore bonvenaj.

Estrarkunsidoj okazis 2 pri ĉefe organizaj demandoj kaj intencitaj laboroj.

Kotizoj: Laboro por E. postulas monon. La kasistino alsendos ĉekojn, bonvolu ensendi la monon. Dankon!

Kongresfotoj mendeblaj en la oficejo; 30 g, sendkostoj 5 g.

Insignoj: Ĉiam kaj ĉie portu nian insignon. Stelo sur blanka grundo en la oficejo: mez-granda 30 g, granda 40 g, sendkostoj 20 g.

Instigoj kaj deziroj volonte estas akceptataj.

Fondo de Reprezenta Komitato (RoKo).

Por ebligi interamikiĝon inter la aŭstria esp-istaro kaj komunan laboron sur diversaj flankoj la reprezentantoj de AEA. kaj AEF. (Aŭstria E.-Federacio) decidis fondi „Reprezentan Komitaton de la Aŭstria Esperantistaro“ (RK.).

Post unue senfruktaj priparoladoj en E.-Muzeo kaj antaŭa kunveno en aprilo en la societejo de „Danubio“ la fond-kunsido okazis la 10. de majo. La laboroj de RK. en plena konkordo, bazitaj sur reciproka elkora kaj plena konfido jam komencis. Dank al la laboroj de AEA. sub ĝia iama prezidanto la E.-movado en Aŭstrio jam posedas tegmenton; RK. estu la „Roko“, sur kiu estu kon-

struataj kaj submasonataj la fundamentoj de la konstruaĵo por la Aŭstria E.-movado. Se la domo estos preta, la movado estos venkinta. Ek al la laboro!

La membroj de RK.: flanke de AEA.: reg. kons. Stengel, kalk. kons. R. M. Frey, d-ro E. Pfeffer, E. Werner, R. Ulbrich; flanke de AEF.: prof. d-ro H. Jokl, P. Glüxmann, Berdan, Hagen, dir. Feder.

La laboroj.

Aŭstria E.-Instituto, fondita de AEF. por science esperantaj celoj estas — ĉar ĝi estas tutaŭstria afero — funkciigata de RK. Provizora gvidanto d-ro Grimme.

Esperanto-semajnoj: RK. deklaras la tempon de 27. sept. — 16. okt. 1937 „Esperanto-semajnoj". Ili estu la tempo de plej energia laboro kaj dum ĝi propaganda ondego invadu Aŭstrion. Per ĉiuj rimedoj la landaj asocioj propagandos; la grupoj organizu same insistan propagandon kaj ĉiu unuopa esp-isto kunhelpu. En Wien AEA. kaj AEF. aranĝos grandstilan rememorfeston okaze de la 50-a datreveno de la estiĝo de Esp. Ni invitas la grupojn (en lokoj, kie estas AEF.-grupoj, kun tiuj) prepari similajn festojn, kiuj okazu meze de oktobro. Sub la impreso de la jubileaj festoj, al kiuj oni invitu kiom eble multajn ne-esperantistojn, kiuj serioze kaj digne varbu por nia ideo, tuj poste komenciĝu kursoj. Jam nun oni eklaboru! AEA. volonte konsilos kaj helpos al la aranĝantoj.

Interamikiĝa ekskurso al Bratislava: RK. aranĝas kun „Verein f. Fremdenverkehr und Heimatkunde", dimanĉe, la 20. junio, grandstilan ŝipekskurson al Bratisslava, al kiu ni invitas la gemembrojn de AEA. Programo: Kunveno 7 h antaŭ DDSG. ĉe Urania; 11 h la Bratislavaj s-anoj akceptos nin ĉe la ŝipo, urbvizito, reveturo 16 h, alveno Wien 22 h 30. Rabatita reveturprezo š 4. Aliĝo pro prizorgo de komuna pasporto ĝis 11. junio ĉe AEA. kaj IEMW. (kunsendu veturprezon, Heimatschein kaj Meldezettel). Por junuloj speciala formalaĵo (petu informon). Vojaĝgvidanto d-ro Klarfeld. Partoprenu multnombre!

Kontrakto

pri kunlaborado en Aŭstria Esperanto-Movado.

Aŭstria Esperanto-Asocio (AEA.) la landa organizo de Internacia Esperanto-Ligo (IEL.) kaj **Aŭstria Esperanto-Federacio** (AEF.), ne apartenanta al internacia organizo,

ambaŭ konsiderante la gravecon de unueca reprezentado de la Aŭstria Esperanto-movado, interkonsentas jenan kontrakton:

Por priparoli kaj aranĝi komunajn aferojn, kies memstara traktado povus malutili al la Aŭstria Esperanto-movado, la nomitaj organizoj formas konstantan komitaton, nomatan „Reprezentanta Komitato de la Aŭstria Esperanto-movado" (RK), konsistantan el po 5 delegitoj de la nomitaj organizoj. Inter la delegitoj devas esti la prezidantoj de la ambaŭ organizoj kaj minimume po du estraranoj. Kiel delegitoj estas rigardataj tiuj personoj, kiujn la kontraktantaj organizoj skribe nomas. La delegitoj elektas la afergvidantaron de RK, konsistantan el gvidanto (prezidanto de RK), vicgvidanto, protokolanto kaj vicprotokolanto. Tiuj 4 oficoj estu egale dispartigitaj inter la ambaŭ organizoj.

RK kunvenas laŭ-bezone, sed almenaŭ kvarfoje en la jaro. La voĉdonoj okazas per simpla plimulto. La RK-prezidanto kunvoĉdonas. RK-kunsido estas decidrajta, se ĉeestas almenaŭ po 3 delegitoj. En ĉiu kunsido de RK la voĉnombroj de ambaŭ organizoj devas esti egalaj.

Ĉiuj publikigajoj deciditaj de RK devas samtekste aperi en la respektivaj oficialaj organoj (nuntempe „Aŭstria Esperantisto" kaj „Bulteno de AEF") kiel „oficialaj komunikoj de RK" (komuna laborkomitato de AEA kaj de AEF) kaj esti subskribitaj de ambaŭ RK-gvidantoj.

La kontraktantaj organizoj devigas sin precipe,

1e) ne enmiksi sin reciproke en la internan organizon, nek en jam akiritajn agosferojn, sen eventuala priparolo kaj decido de RK,

2e) ke ĉiuj iniciatoj, decidoj, eldiroj kaj aranĝoj, kiuj okazu en la nomo de la Aŭstria Esperantistaro (en la nomo de la E.-movado en Aŭstrio), ne estu farataj de unu organizo aparte, sed nur laŭ interkonsento en RK. Reprezentantoj de aliaj Aŭstriaj E.-korporacioj aŭ entreprenoj neapartenantaj al unu kontraktantaj organizoj estas en RK akcepteblaj kiel konsilantoj sen voĉdonrajto.

Tiu ĉi kontrakto estas laŭbezone pli ampleksigebla kaj tempe ne limigita.

Beste Werbung für Esperanto.

Wenn Du werben willst, sage nicht, daß Esperanto eine ideale Sache ist, daß es praktisch und nützlich ist, sondern — daß es nun Mode ist, Esperanto zu lernen! Dann wirst Du Erfolg haben!

Plej bona varbado por Esperanto.

Se vi volas varbi, ne diru, ke Esperanto estas ideala afero, ke ĝi estas praktika kaj utila, sed — ke estas nun laŭmoda, lerni Esperanton! Tiam vi havos sukcesoń!

Nuligo estas ebla nur laŭskribe antaŭanonco post paso de tri monatoj.

La teksto de tiu ĉi kontrakto kaj la listo de la delegitoj estas publikigotaj en ambaŭ oficialaj organoj.

IEL.-delegitoj ne ekzistas en multaj lokoj de Aŭstrio. Ni petas akceptu tiun honoroficon en ĉiu loko, kie ne ankoraŭ estas delegito. Estu honoro por Aŭstrio, havi ĉie delegitojn de IEL.

IEL. — UEA.

AEA. aliĝis siatempe tuj al IEL., ĉar IEL. estas la organizo, kiu kiel posteulo de ICK., unuigas la landajn organizojn por komuna grandstila laboro.

Kiel IEL. ankaŭ AEA. ne deziras luktadon kun UEA., sed esperas, ke montriĝos vojo por paca interkonsento en la intereso de nia movado.

TUTMONDA ADRESARO.

Ni invitas ĉiujn AEA.-anojn aliĝi, por ke AEA. komplete estu en la ADRESARO. Kotizo ŝ 1.20, por senlaboruloj ŝ 1.— estu kolektata en la grupoj kaj sendata al ni. Por ĉi tiu sumeto ĉiu ricevos la Adresaron senpage.

Ni propagandu!

Propagando kostas monon, tial ni petas, ke niaj s-anoj donacu ion por la propagandokapitalo de AEA. Eĉ la plej malgranda donaco estas danke akceptata kaj kvitancata en 2te Sprache.

Unua listo:	Kort. kons. Steiner . .	ŝ 5.—
	Reg. kons. Stengel . .	ŝ 5.—
	Rud. Ulbrich, Wien . .	ŝ 5.—
		ŝ 15.—

El la grupa vivo:

Innsbruck: Elektoj en la ĝeneralkunveno: klubestro Hans Steiner, vicestr. Rosa Grubhofer, sekr. d-ro A. Karner, vicsekr. G. Gostner, kas. Maria Seewald, Seb. Wiendl, bibl. Chr. Wulz, konsil. M. Stöckl, Maria Esterhammer. Estro Steiner tradukis div. kantojn i. a. „Mutti" (panjo), kiu aperis en „Volkszeitung" kaj „Vorarlberger Wacht". En AE ĝi ne povis aperi, ĉar ĝi alvenis tro malfrue.

Knittelfeld. La ĝeneralkunveno okazis la 25. febr. Grupestro Chmelar faris la raporton, ke okazis 45 grupkunvenoj kun ekzercado, prelegoj kaj amuzaĵoj, krome 11 estrarkunsidoj. La 17. dec. Zamenhoffesto, en kiu kursgvidanto insp. Santler kaj s-ano Pawlik faris la festparoladojn. 14. junio 1936 kunveno kun la s-anoj el Klagenfurt en Friesach. Fine de febr. finiĝis kurso de insp. Santler kun 15 pers. Dankon al „Knittelfelder Zeitung" kaj „Oberland" pro la publikigoj de notetoj. Elektoj: estro Chmelar Hans, vicestro Kletzmayer Franz, kas. Winkler Friedr., sekr. Gruber Alois, estr-anoj s-ino Illmayer, Zuber, Steinkellner, Pilz kaj Jakob. Adr.: Estro Chmelar Hans, Revident der Oest. B. B., Knittelfeld, Genossenschaftsg. 4/8.

Schwaz: En ĝeneralkunsido la 5. majo novelektoj: estro O. Steiner, vicestro A. Stifter, kas. J. Bernlochner, vickas. J. Oberlechner, sekr. A. Reisinger, bibl. A. Fuchs.

Ni deziras al la grupoj pluan fruktodonan laboron kaj petas regulan raporton.

Wien. E.-Klubo kunvenas ĉiun mardon de la 18 h—22 h dumsomere en Wiener Molkerei, Prater, Hauptallee 3. Gastoj bonvenaj. La ekskurso en **junio ne okazos,** ĉar ni invitas la membrojn partopreni en la ekskurso, aranĝata de RK., al **Bratislava.** Partoprenu multnombre!

Wien. Viena Esperanto-Unio reviviĝis. La nova estraro: prez. Max Rud. Frey, cand. jur., d-ro H. Ullrich, sekr. Ant. Denks, Elise Frey, kas. Hermine Sprinzel, protok. Ernst Findeisen, f-ino Jünger, bibl. Karl Trojan. La estraro de Laborkomitato: prez. A. Denks, sekr. M. R. Frey, kas. H. Sprinzel. La funkciado de la ĝisnunaj senatanoj estas daŭrigita je unu jaro. Novelektita en la senaton: E. G. Bernfeld kaj kiel honoraj membroj: urba kons. Franz Bauer kaj kort. kons. d-ro Wilh. Heeber.

La 28. majo Unio aranĝis kurs-finfeston, kiu malgraŭ la tre varma vetero tamen estis bone vizitita. Parolis s-ano N. Hovorka, poste kort. kons. d-ro Heeber kaj prez. de Unio M. R. Frey. Al la novaj honormembroj urbkons. Bauer kaj kort. kons. d-ro Heeber estis trans donataj la honordiplomoj. Sekvis bonega amuza programo, prezentita de la kursanoj kaj de Verda Teatro.

Ni nur povas gratuli al la prez. de Unio kaj deziri bonan progreson. Steiner.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: „Albrecht Dürer", Ges. m. b. H., Wien, VII., Bardgasse 28.